**Agadraporto 2025 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne**

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

**Lokaj grupoj** (substrekitaj) **aŭ kontaktoj** en

• Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.

• Finistère: Douarnenez, Morlaix.

• Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.

• Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.

• Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

**Membraro**: ĉirkaŭ 100. Inter ili estas 71 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj plej multe partoprenas al la komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France: Armor Espéranto, Espéranto-Plouézec, Espéranto Rennes, kaj ekde ĉi jare Hennebont kaj Lorient).

**Agoj de la federacio:**

Eldono de la federacia bulteno **Verda Triskelo** (VT) kun 2 numeroj dum 2025 danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

***Turneoj kaj vizitoj*** *de eskterlandaj Esperantistoj:*

- Turneo de fama pola esperantisto Józef Części dum marto kaj aprilo en Rostrenen, Saint-Brieuc, Rennes kaj Nantes. (legu pli en VT55)

- Turneo de Denis Keefe en pluraj kluboj: Saint-Brieuc kaj Rennes. (VT56)

- Vizito de Litovino Vida en Vannes. (VT55)

Ĝisdatigo de nia retejo kun listo de kontaktoj, prezento de Verda Triskelo, alvokoj al membrokunvenoj kaj agadraportoj de la Federacio: http://bretonio.esperanto-france.org/ administrantoj: Bert kaj Xavier.

**Reta diskutlisto** "Bretonio" de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio(a)esperanto-france.org kun pli ol 200 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis pli ol 90 mesaĝoj dum 2025. Por aboni sufiĉas sendi malplenan mesaĝon al bretonio-abono(a)esperanto-france.org

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

**Jara kunveno** okazis en Nanto kadre de la Interasocia kongreso de Esperanto en Francio, la 7a de junio 2025.

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono.

Eventoj organizitaj de lokaj kluboj: Pluezek 24-25 aŭgusto kun 4 dekoj da Esperantistoj.
Douarnenez: partopreno al ludema festivala semajnfino Brezkebil.

Eblas legi pri aliaj agadoj de lokaj asocioj en la lastaj numeroj de Verda Triskelo legeblaj en la retejo de la federacio http://bretonio.esperanto-france.org/